



## Enhavo

- Afrika Kongreso decembre
- KER-ekzamenaj: okazoj ĝis aŭgusto
- Vojaĝo tra Rusio ĝis Mongolio
- Kanzona konkurso en Italio
- Kongreso de ILEI – limdato!

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-05 sendita el Budapeŝto la 18an de marto.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Progresas preparoj por la 7a AKE

La 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) estos kvazaŭ monda evento kun riĉa movada, eduka, instrua, ekzamena, kultura kaj ekskursiva programoj Ĝi okazos en Buĵumburo, Burundo, de la 21 ĝis la 27 de decembro 2019 dum plena semajno sub la temo: 'Verdigo de la kontinento afrika'. La aranĝo sidejos en la domo de *SOS-enfants* en la periferia kvartalo Nyakabiga de la ĉefurbo burunda. Ĝin organizas kunlabore la Afrika Komisiono de UEA kaj la burunda Esperanto-Asocio ANEB. La prezidantino de ILEI Mireille Grosjean partoprenos.

La konkreta progreso temas pri la nomumo de Loka Kongresa Komitato (LKK), kaj la starigo de paĝaro en la retejo de la Afrika Komisiono pri la kongreso. Vizitu ĝin ĉe:

<https://www.esperanto-afriko.org/7aake.htm>



AKE rolas kiel okazo por Esperanto-parolantoj el Afriko kaj aliaj mondpartoj kunsidi, interŝanĝi ideojn, diskuti kaj plani agadojn por la afrika movado. Ankaŭ por spertiĝi amuze kaj ĝue en internacia etoso.

La partoprenantoj de la 7-a AKE havos okazon viziti Burundon, konatiĝi kun ĝiaj urboj, vidindaĵoj kaj kuriozaĵoj. Ili povos ĝui ĉiutagan

artan programon de afrikaj kaj alikontinantaj artistoj, inter kiuj estos Joel Muhire Ndaziboneye el DR Kongo - liaj muzikpecoj provaŝkulteblas per

<https://senopone.wordpress.com/albumo/2-esperanto-ilo-de-paco>.

Ĉiujn demandojn rilate al la kongreso, prelegproponojn, aliĝojn oni bonvolu sendi al [afrikakongreso7@gmail.com](mailto:afrikakongreso7@gmail.com), [jerrybs21@gmail.com](mailto:jerrybs21@gmail.com) kun kopio al [ake-2019@yahoogroupes.com](mailto:ake-2019@yahoogroupes.com)

### **Loka Kongresa Komitato de la 7a AKE**

1. Jeremie SABIYUMVA Loka Ĉeforganizanto: Kunordigado, komunikado, vizoj, rilato kun TEJO, eksteraj rilatoj: [jerrybs21@gmail.com](mailto:jerrybs21@gmail.com); Rumonge
2. Aime-Patrick MANIRAKAZI, Kunordigado, kontakto kun la lokaj ŝtataj aŭtoritatoj, kongresejo; Respondeculo pri kulturaj aranĝoj, sekureco; Nyanza-Lac kaj Bujumbura
3. Hasano NTAHONSIGAYE: Loka financa respondeculo; Rumonge
4. Twalibu BIKIRANTANGANWA: Manĝado; Makamba
5. Gilbert NDIHOKUBWAYO: Tanoktado, Loka sekretario; Bujumbura
6. Ada Florence IRACADUKUNDA: Helpo en la kongresejo; Bujumbura
7. Gilbert NYUKURI: Turismo, kongresejo; Bujumbura kaj Rumonge
8. Jean Claude BAZUMBAZE: Transporto; Ngozi
9. Cedrik IRAKOZE : Kulturaj aranĝoj; Bujumbura.

## **Alvoko al KER-Ekzamenoj en 2019**

La Esperanto-societo *Tibor Sekelj*, Subotica (Serbio), kore invitas gesamideanojn el nia regiono kaj pli vaste por partopreni la KER-ekzamenon, kiu okazos en Subotica la 15-an de junio 2019, tio estas la 8a Tutmonda Ekzameno-Tago en 2019.

Tiam vi havos eblecon konfirmi vian scion de Esperanto je diversaj niveloj kaj akiri kvarlingvan atestilon de la budapeŝta ŝtata ekzamencentro ORIGO (pli frue ITK), ekzamencentro de la Budapeŝta Universitato Lorand Eötvös ('ELTE'), atestilon agnoskatan en-kaj ekstermovade.


Tiun ĉi eventon gastigas jam la kvaran fojon la Politeknika Lernejo, kies estraro forte subtenas la internacian lingvon kaj ni, esperantistoj, deziras daŭrigi la komencitan kunlaboron inter la Lernejo kaj la Eo-societo rilate al la KER-ekzamenoj.

Ekzistas foto-albumoj pri la ĝis nun organizitaj ekzamentagoj - ekzamenoj kaj la posttagmeza Amika Kunveno kun kultura kaj amuza programo:

Por informoj pri la ekzamenoj entute: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker> kaj specife pri la sesioj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Pliaj sesioj por la Tago estas jam akceptitaj en Londono (GB), Ŝimonoseki (JP), La Chaux-de-Fonds (CH), Tokio (JP), Bostono (US), Zaozhuang (CN), Maceio (BR). Estantaj EKO-komunikoj pretas aperigi mallongajn informojn pri pliaj sesioj.

Ĝis la Ekzameno-Tago okazos pliaj sesioj en Rimini (IT) en la IJF, Greziljono (FR), Malaga (ES), Raleigh (US) en NASK. Proponataj estas sesioj plie en la UK kaj la IJK.



## Unika vojaĝpropono el Rusio

Se vi ŝatus realigi unu el viaj revoj - viziti Rusion kaj konatiĝi kun kelkaj el ĝiaj urboj kaj iliaj vidindaĵoj, ekvidi multkulturan landon, trajnveturi laŭ la longdistanca Transsiberia fervojo, pasigi kelkajn tagojn ĉe la lago Bajkal kaj poste en Mongolio kaj Ĉinio, jen propono por vi:

Okazos ekde la fino de la Universala Kongreso en Lahti (Finnlando) la postkongresa Esperanto-Karavano (EK-2019), vojaĝo neforgesebla kaj siaspece aventura. Eblas parta partopreno, ekz. ekde Sankt-Peterburgo. Limdato por aliĝo: la 5a de aprilo.

Pliajn detalojn bv.legi en

[www.esperanto-karavano.info](http://www.esperanto-karavano.info) .Retpoŝte: [esperantokaravano@gmail.com](mailto:esperantokaravano@gmail.com)



Ne temas pri oficiala postkongresa ekskurso ene de la oferto de UEA, sed tiaj rusaj trajnekskursegoj jam havas tradicion ligitan kun Universalaj Kongresoj.

Informoj venis de: Tatjana Loskutova.

## Kanzona Konkurso memore al Gianfranko Molle

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranko Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La konkursa komisiono povos asigni ĝis tri premiojn. La rezultoj estos anoncitaj dum specifa programero enkadre de la itala kongreso de Esperanto (pri kiu ni informos en baldaŭa EKO-komuniko). Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). La maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj.



La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, per retmesaĝo, al la adreso [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it) indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

**Premioj:** la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj.

**Limdato** por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro.

**Juĝkomisiono:** prezidanto: Carlo Minnaja, sekretario Ivan Orsini, juĝantoj: Giulio Cappa, Renato Corsetti, Marcella Fasani

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo. Por pliaj informoj: [concorso@esperanto.it](mailto:concorso@esperanto.it) aŭ FEI, concorso, via Villorosi 38, IT 20143 Milano.

## Venas la unua kotiza limo por la ILEI-Kongreso

Tio okazos en la 31a de marto 2019. Detaloj ĉe: <http://www.ilei.info/>

Vortoj: 905

=====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.